La prezidanto bonvensaluu je la 14-a la multnonbran ĉeestantaron kaj malfermis la kunsidon per alparolado en kiu li substreks la esceptan gravecon de la kunveno : ĝi signos la komencon de nova periodo por nia Ligo kiu ekde 1947 reaktivis. Novaj ĉefestraro kaj estraro estas necesaj; ilin konsistigis entuziasmoj, kon-vinkitaj, konsciencaj kaj laborpretaj kom-pentuloj. Li akcentis ke F. L. E. ne estas federacio de pli malpli memstaraj lokaj societoj, sed LLGO. Tio signifas, ke UNUAVICE ni sentu nin membroj de F. L. E., nur DUAVICE anoj de niaj respek-tivaj sekcioj. Pli gravas la tuto ol unu el ties partoj, pligravas la bonfarto de nia nacia Ligo ol la bonfarto de unu sekcio. La prezidanto volegis la artikolojn de la Liga statuto rilate voĉdonojn. Li klarigis, ke ni troviĝas en transira stato : la Ligo ja ne plu aktivas depost 1942. Pro tio ne estas ebla skrupule observi la koncernajn artikolojn de la statuto. Konsiderante ke la ĉeestantoj konsistigas la plej valoran kaj plej aktivan parton de la flandra esperantistaro, li proponas ke ia ĉeestantoj elektu la estrarojn.

Ĉiu konsentis, escepte Brugge kiu be-daurus ke tiamaniere sekcioj gravaj kaj malgravaj estus egalrajtigitaj. Post dis-kutado la kunsido decidis, ke la elektitaj estraroj estu provizoraj.

La prezidanto faris proponojn por la diversaj postenoj de la ĉeestraro. Pro la fakto ke tri gravajn postenojn li proponis al membroj de sekcio Brugge ties prezidanto protestis : la bonfarto de la sekcio bezonas ĉiujn lokajn aktivulojn. Le prezidanto denove akcentis, ke ne lokaj inter-resoj devas diki nian konduton, ke ni devas konduti malegoismoj kaj unuavice devas atenti la bonfarton de F. L. E. Sekcio Brugge, kiu estas unu el la plej mer-itaj sekcioj kaj unu el la plej gravaj ne rajtas eviti la laboron por la Ligo. Post longa diskutado en kiu partoprenis pluraj ĉeestantoj la prez. de sekcio Brugge, Sano Roose, deklaris ke la koncernaj personoj devas mem decidi. Tiu ĉi deklaris sin pretaj akcepti la proponitajn postenojn kaj la elektado de la ĈEFESTRARO povis okazi. Estis elektitaj :

**Prezidanto :**

D-ro T. van Gindertaelen (Mechelen).

**Viceprezidanto :**

D-ro F. Couwenberg (Blankenberge), D-ando F. Roose (Brugge), D-ando E. Symoens (Brussel).

**Generala sekretario :**

G. Maertens (Brugge).

**Dua sekretario :**

E. Debaets (Brugge).

**Kasisto :**

A. De Keijzer (Brussel).

**Membroj :** L. Alofs (Brussel), E. Cortvriendt (Brussel), G. Debrouwere (Kortrijk), A. Lodema (Antwerpen).

La ESTRARON konsistigas : 1) la dele-gitoj de la lokaj sekcioj; 2) la prizorgantoj de la servoj; 3) la lokaj reprezentantoj. La ĉefestraro faros la necesajn demarsojn por enoficigi la sub 1) kaj 3) mencitajn estraranojn. Rilate la prizorgantoj de la servoj kiu kunsido enoficigis : Prof. E. Symoens (radio), E. Cortvriendt (ekspozicioj), D-ro Fr. Couwenberg (ekzamenoj) kaj F. Volders (kongreso).

La fiksado de la kotizoj por 1947 okazis glate :

Membro : 75 fr.

Membro-Subtenanto : minimume 125 fr. Kunloganta familiaro de membro : 25 fr.

Ekcepte la « kunlogantaj » membroj ĉiuj ricevos la ligon organon F. E. La sekcioj ne rajtas havi membrojn nealignantaj al F. L. E. Por ne-Liganoj « Flan dra Esperantisto » estos aparte abonebla je la samaj kondiĉoj de 1946.

Post la paŭzo la prez. komunikis ke Sano G. Debrouwere donacis 1.000 fr. al la liga kaso. Saman sumon donacis anonimulo, kaj Sekcio Antwerpen 200 fr.

Poste la kunsido aŭdis kaj aprobis raporton de la komisiono starigitaj por ekzamenoj kaj difini la rilatojn inter F. L. E. kaj F. E. I. kaj por pristudi eventualajn ŝanĝojn al la statuto de F. L. E.

Je la 18-a la prezidanto fermis la kunsidon.

Et. DEBAETS,  
Dua Sekretario F. L. E.

Kiel kutime F. E. I. arangis interesan librostandon en la intimaj salonoj de « Vlaamse Club », dum la paŭzo ĝi logis ĉiujn libramontojn. Post la kunveno la ĉeestantoj guis agrablan kunsidadon kaj gramofonomuzikon, dum la gedancemuloj havis okazon movigi la krurojn.

## EENS, IN DE TIJD TOEN DE MENSEN NOG SPRAKEN

door  
FRANS CAROLINA RIDWIT

Baka en Biki, de moedermuis en haar jong, zaten vlak vóór de ronde ingang van hun holletje. Zoals elke avond zaten ze hier en het was goed zo : licht en warm. De warmte en het licht — en dan de muziek! — kwamen hier rechtstreeks binnenvallen uit het enorme hol, waarin mensen woonden. Slechts nu en dan viel er ook een schaduw in het holletje, wanneer de geweldige voeten van een der mensen voorbijstapten.

Zolang die mensen daar waren verlieten Baka en Biki hun holletje nooit — de mensen waren toch zo wreid — en genoten van het licht en de warmte, niet van de muziek, want ze maakte hen somtijds halfgek en de mensen in het grote hol ook, die begonnen dan eensklaps sprongen te maken met hun geweldige voeten en dan leek het wel een aardbeving, waarvan de kleine Biki telkens brakerig werd.

Vanavond is het heel rustig in het grote mensenholt en in het nauwe muizenhol. Biki doet wat zij op alle rustige avonden doet : ze haalt het sprookjesboek uit een wandspleet van het holletje te voorschijn. Het is een lijvig boek met vele prenten en vele verhalen, geschreven door de beroumdste muizendichter Snorsnuit.

Het valt Baka dadelijk op hoe de kleine Biki zonder enige glinstering in zijn parel-oogjes toekijkt en volstrekt niet zo dolblij is als anders, wanneer moeder wat wil voorlezen uit het grote boek. Integendeel, een heel fijn rimpeltje loopt tussen de ogen van Biki, alsof het heel ernstig over dingen denkt, die niets met sprookjes te maken hebben.

Maar toch heeft Biki gedacht over dingen, die met sprookjes wel te maken hebben, want, net als moeder zich de keel schraapt om met lezen aan te vangen,

zegt het plots met zijn scherp piepstemetje :

— Moe Baka, waarom beginnen die sprookjes toch altijd met : « Lens, in de tijd toen de mensen nog spraken... »? De mensen spreken nog altijd, hoor maar...

Baka grinnikt. Daarover heeft haar kleintje dus zitten piekeren.

— Ach kind, zegt ze, die sprookjes van ons beginnen zo om dezelfde reden als de sprookjes der mensen steeds beginnen met « Eens, in de tijd toen de dieren nog spraken... »

Biki kijkt erg diepzinnig.

— Wij spreken toch nog, moe Baka...

Baka schudt ernstig haar grijzend hoofd.

— Wij muizen spreken en begrijpen elkaar, wij hebben een muizentaal... Maar de katten, de honden of de kippen spreken ook, maar wij begrijpen ze niet en zij ons niet... Er is geen dierentaal meer...

Het rimpelde tus-schen Biki's oogjes is scherp geworden. Het muizenjong doet erg z'n best om te begrijpen.

— Ja, moe Baka, er was dus een tijd, dat de muis met de kat sprak en de kat met de tijger... En waren de dieren toen zo gelukkig als in de sprookjes verteld wordt?...

— Inderdaad, kind, de dieren waren toen gelukkig... Het was toen de paradijs-tijd, de tijd van vrede en zaligheid, allen voedden zich met wat de grote lustnuin hun schonk... Wij dartelden, speelden en praatten met elkaar, zelfs met de mensen...

De kleine Biki zet heel grote ogen.

— Praatten wij met de mensen?

Baka schudt zielig het hoofd.

— Er was toen slechts één taal voor mens en dier, antwoordt ze zacht, en op zekere dag praatte de slang met één van de mensen... Het gebeurde onder een appelboom, wiens vruchten noch door

mensch of dier mochten gegeten worden op bevel van de Grote Baas van het para-dis... De slang — dit valse monster — haalde één der mensen over om van een der appelen van de boom te eten en die ene mens verlokte de ander om hetzelfde te doen... De Grote Baas werd toen zo almachtig woedend, dat hij mensen en dieren gewoon uit het paradijs verjoeg naar de aarde, waarop we thans leven...

De oortjes van Biki trillen van spanning.

— Wat die aarde was, m'n schatje, zucht Baka, kun je zelf wel zien : de een vreet de ander op om te kunnen leven... De aarde was niet mild als het paradijs en mens en dier vonden ras, dat er in dit barre oord slechts plaats was voor kracht en sluwheid... De sterkere dieren vielen op de zwakkere aan en verslonden ze... Maar de mens bleef alle dieren de baas door zijn sluwheid en doodde ze met steen, met hout, met vuur, ja, met alle dingen die zijn menselijk vernuft kon bedenken... De aarde werd een moordkuil, een verschrikking...

De angst voor de dood lokte tot aanval en dreig tot vlucht... Elke diersoort schuwde of begeerde de andere, het werd een onafgebroken doden-of gedood worden... Slechts twee geluiden hoorden de verschillende dieren nog van elkaar bij een ontmoeting : een triumfkreel en een doodsgereutel... Elk soort sprak zijn eigen taal, de dieren « begrepen » elkaar niet meer...

Op Biki's anders fluwelen lijfje staan de haren nu overeind.

— Maar, kreunt het, de mensen, moe Baka?... Waren er mensensoorten?

Baka wacht lang met haar antwoord. Het valt haar moeilijk het zo uit te leggen, dat dit dopje hersens van Biki het kunnen verwerken.

— Kijk eens, snoetje, zegt ze aarzelend, met de mensen is het een dwaas geval... Zij kenden geen soorten, maar zij maakten er... Het doden ontaarde bij hen van een noodzaak tot een lust... Hun vernuft reikte zo ver boven alles, ze vonden ten slotte zuike wrede moordtuigen uit, dat de jacht op het weerloze dier een saaie boel werd voor hen... Ze verlangden gauw naar iets, dat hun groeiend vernuft weerstand kon bieden, de jacht zoals welcer tot een gevecht kon maken, en wat kon het vernuft van een mens beter weerstaan dan het vernuft van een ander mens?... Toen gingen ze met hun tuigen elkander te lijf en het verging hen precies als de dieren... Dra waren ze in soorten verdeeld d'e elkaar bekämpften, elkaar schuwden, elkaar beloerden... Onder hen zijn er die brullen als leeuwen, die blaffen als honden, die blaten als schapen, die piepen als mui-zien... Elk soort spreekt zijn eigen taal, zij « begrijpen » elkaar niet meer...

Heel, heel diep is tens de rimpel tus-schen de oogjes van Biki. Het muizenjong moet zijn dopje hersens voos denken.

— Als de mensen zoo ontzaglijk veel vernuft hebben, moe Baka, zegt het einde-lijk flauwtjes, om helse tuigen te maken, kunnen zij dan niet een taal maken om elkaar wél te « begrijpen »?...

Baka kijkt even verbluft op. Wat heeft zoo'n klein ding toch een klein verstand.

— Natuurlijk, kind, zegt ze medelijwend. Zij maakten ook een taal die ze allen kunnen begrijpen — Esperanto heetten zei ze geloof ik, — de mensen kunnen alles maken, zij maakten zelfs een tuig waarmee ze de ganse aarde kunnen vernietigen — atoombom noemden zij het... Alleen geraken ze het er niet over eens wat ze het eerst gaan gebruiken : de taal of de bom!

Biki schijnt nu wel een egeljong, zo stijf staan de haren op zijn rillend lijfje.

Baka voelt diep medelijden met haar arm jong. Ze tracht te glimlachen en ze troost zo zacht als een moeder troosten kan :

— Ach, m'n hartje, de mensen zijn zo sluw... Misschien gebruiken ze toch wel eerst de taal... En dan zorgt onze grote dichter Snorsnuit gauw voor andere sprookjes... Zal ik je nu dit maar voor-lezen?

Biki knikt en terzelfder tijd glijden waarachtig twee grote tranen uit zijn pareloogjes.

Baka tikt even zacht tegen het natte snuitje van Biki. Hoe gevoelig zo'n petie-terig ding toch kan zijn. Dan begint moe Baka met haar fijne stem luidop te lezen :

— Eens, in de tijd toen de mensen nog spraken...



**LA PERFIDO** de A. M. de Jong. El la nederlanda tradukis : W. F. Kruit. Eidonis: Libro-Servo de Federacio de Lab. E-istoj en Amsterdam. Kontrolita de « Literatura Komitato »; 244 p. en plaēa, ilustrita kartonbindo. Mendebla ĉe F. E. I. Prezo : 50 bfr.

Estas superflue detale prezenti al flandra leganto ĉi tiu trafan produkton de la sentema realismo, tiel bone akordiganta kun la nederlanda popolkaraktero. Se ĉiu bona traduko estas bonvena kontribuo al la lingvo, ĉi tiu estas neordinare signifa, ĉar principe ĝi ne povas esti ekvivalenta al la originalo (la tradukinto ĝenerale eĉ neas tian eblecon) por la abundaj esprimoj dialektaj, en neevitebie eniras la internacion lingvon en pli malpli sensuke deca formo, kiel ekz. « sentaūgulo » por « slampoemper » kaj « estas » por « kwikmedril » kvankam oni kelkloke sentas eblecon al pli drasta esprimo (ekz. « zonder een poot uit te steken » : « sen ia ajn peno »; « in m'n kleviere krijge » : « kapiti »).

En Esperanto oni emas postuli, ke tradukoj estu farataj de « samlingvanoj » de l'aŭtoro. Despli prave oni tion postulu pri verko en la tiom nuancita dialekt.

La tradukinto sukcesis sufiĉe kontentige solvi la nefacilan problemon per la uzo de simplaj, ofte bontraj parolturnoj. Kelkfoje oni tamen haltas ĉe dialogeroj aŭ esprimoj, kiuoj ŝajne ne akordigas kun la klereca grado de l'parolantoj (ekz. p. 124 : « doar 'ou ik m'n eigen oan »; « tio estas mia kriterio ») aŭ kun la pensenvortigo de juna knabo p. 71 : « soms kom' ok wel es presies ammal uit »; « glate rekonstuigas »). Hazardo ni remarkis p. 187, 11-a l': netradukitan frazoparton.

Kyankam ni ne aprobas iajn formojn (i. a. « mis » en senco « malbon ») (slecht, boos, kwaad) kaj « absolute ne » por « tute ne ») ni nur povas laudi la konscian klopodon de l'tradukinto al lingva korek-teco. Ni ne dubas ke la eta heroo, la revema, teologiema knabo Merijntje « tipita » en la folkloro, iuflanke kruda kadro de brabantia vilago, akros ankaŭ la internacia simpatia kaj kortuso per ĉi tiu plaēa eldonita traduko, malgraŭ tio, ke li ne restis 100%... aŭtohtona.

TYN.

**JARLIBRO DE INTERNACIONAL ESPERANTO-LIGO 1946.** Neacetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de F. L. E. (aliigiloj haveblaj ĉe la ĉefdelegito por Beijgojo : G. van den Bossche. Oostenstraat 26, Antwerpen); 2 vol. 184 + 52 p.

Folumante tiu ĉi modestan sed jam valoran jarlibron, kiu i. a. montras gravan kreskon de F. L. E., ni plezure konstatas, ke en la koncerna rubriko oni forlasis la konfuzigajn (francelingvajn) tradukojn de la flandraj loknomoj. Alia konstato : en la jarlibro la adresoj de la belgaj delegitoj apenaŭ plenigas du paĝojn! En eksterlando oni sen ia dubo per tio akiris tutcraran opinion pri la forteco de la ĉi-tea neutrala E-movado. Tiu fakteto estas konsekvenco al la ne-aligo de Flandra Ligo Esperantista, kiu atendas la de ĉiu sopiran reuniĝon de la internacia E-movado. Gi okazu plej baldaŭ!

La dua parto enhavas, krom kompletigoj, seppaġan « legān » terminaron. Kial ne « juran »? Eco.

**PLI OL FANTAZIO** de Agnes Bogh-Hogsted. El la dana tradukis : C. Graversen. Eldonis : Dansk Esperanto-Forlag en Aabyhoj : 74 p. Mendebla ĉe Flandra Esperanto

Mi estas nur malriĉa kampulo, kaj malgraŭ mia multa mizerio la kampula vivo ŝajnas al mi la plej bela sur la tuta tero. Interŝangi, eĉ kontraŭ reĝo mi ne volus. Dio, mi dankas Vin pro tio, ke Vi kreis min kampulo!

Tie, en tiu kabano mi naskigis. Ni estas dek kvin satigotaj bušoj, kaj kvankam kelkafoje pli abundis la frapoj ol la mangoj, en tiu juneca tempo ni plenkreskis kiel arboj.

Granda familio estas plezuro. Mi ŝatas grapolon da infanoj. Ĉe bona arbo abundas la fruktoj.

Al mia edzino mi neniam rifuzis infanetojn. Kulturi estas nia destino. Infanojn samkiel brasikojn. Tiel havas sencon la vivo kaj laboro. Al miaj gepatroj tio ankaŭ ne malutilis. Si, okdekjara sed rekta kiel lato, fajfante portis sakon da terpomoj supren al la fojnejo. Lin la laboro demandosigne kurbigis. En la ĉerko li sidis rekte, aŭ elstarigis liaj kruroj. Necesis lin krake etendi. Verdire, mi tion faris. La aliaj ne kuraĝis. La maljuna junkrino de l'kastelo kies luprenantoj ni estas, ofte proponebis al li ĝardenistan postenon. Malmulte da laboro, bonan salajron kaj parton en la gajno de l'fruktovendo.

— Fi! li diris. Kampulo restu kampulo, se ne la irado de l'tero haltigos.

Grumbli kaj ĉagreni li kapablis, tial ke el ni nur unu sentis emon al la kampula okupo.

Mi havas fratojn kaj fratinojn en Antverpeno kaj Bruselo, du estas en Ameriko, unu en Franclando, unu — freneza — estas en Geel (1), tio ja povas okazi en ĉiu estiminda familio, kaj unu estas fratulo ĉe la nudpiedaj patroj en Dendermonde. Tiu ĉi nur vizitas nin, kiam en sia monahejo oni bezonas monon.

Tial nia patro ĉiam nomis min: nia radiko. Mi restis, forlasis la kampon mi ne kapablis. Tio estas inklinio. La kampo vin logas. Vi ŝatas ĝin, ŝajne senkiale.

Finfine pravas la sinjoro pastro, kiam li diras, ke la kampo estas speco de malamiko, ia giganto, kiu kontraŭstaras al ni tagon post tago.

Korpe kaj anime necesas kontraŭagi al li. Ĉu vi jam pripensis, kio necesis antaŭ ol surtabligas via pano?

Plugi, sterki, erpi, semi, rikolti, draſi, mueli kaj baki. Kaj, se la Kara Di-Sinjoro ne helpas ĝustatempe per ŝuto da akvo kaj strio da suno, kaj se la Sanktulojn vi ne subaĉetas per kandelo pro la limakoj, vermoj, fulmo kaj tondro, tiam finrezulte ĉiu via ŝvito perlis ja vane. Sed, kiam de l'nova rikolto en viaj krudaj manoj vi tenas la panon kiun proprapene vi ŝiris el la tero, kaj se en ĝin vi povas enigi la dentojn okulante dume al plena tablo de mangajoj, tiam ŝajnas ke la Ciela Estro ripozigas sian manon sur vian ŝultron, kaj mallaŭte flustras al vi en la orelon: Tre bone, Radiko, dankon!

Ne, laŭ mia imago la kampo ne estas giganto, sed gigantino, ia grandega homino, kies tinon vi ne perceptas. La aero estas ŝia vizaĝo. Si logas vin. Vi kuras, rampas trans ŝian korpon. Kiel ĉiu virino ŝi nature kontraŭstaras al vi. Sed precize tio estas bona. Senĉese vi flatas kaj karesas ŝin. Kaj tiam ŝi iĝas milda kaj servema, kaj ŝi donas, donas senhalte!

Kampulo ankaŭ enlite bezonas taŭgan virinon, sed tie kušadi al ŝi ne konvenas. Buterumi ŝi deyas, priorgi la mangajon de homoj kaj bestoj, kune peni foruzante ŝiajn manojn ĝis postrestas nur la kubutoj. Miatempo mi estis koko kaj amindumis multajn knabinojn, eĉ batalis pro ili. Sed, verdire, tio okazis precipe por kvietigi mian batalemon. Mi atendis la maloftan perlon, kaj tiu venis neatendite.

Mia Fien venis de trans la Nethe (2). Strange kiel la amo konkeras homan koron.

Dum pilgramado al Scherpenheuvel — tien mi ĉuijare piede pilgrimas —, ni tie sidis en ĥomplena trinkejo, mangante nian kunportitan panon. Ekstere pluvis, la planko estis kota. Ni sidis vid-al-vide, sed mi ankoraŭ ne rimarkis ŝin. Estis tie tioni multe da homo, kaj miaj pensoj vagis. Por ebligi trairon al kamparanino mi forsoviĝis kaj neatendite renversis mian glason da biero. Timante pro ŝia robo ŝi salte levigis, kaj ŝiaj pantranĉoj falis teren. Mi konfuziĝis, kaj donis al ŝi tri el la miaj. Ŝi ne volis ilin akcepti.

— Tiam ankaŭ la miajn mi jetos en la

## MI ESTAS NUR MALRIĈA KAMPULO

### UNUA ĈAPITRO EL "KAMPULA PSALMO"

Verkis: F. Timmermans.

Tradukis: Eco.

Hejme mi kaše informis miajn fratojn.

La sekvantan tagon sur la akriga ŝtono ni kvarope pretigis niajn tranĉilojn. En la mallumo ni ekiris. Siaj fratoj krie petis kompaton, sen ke ni devis uzi niajn tranĉilojn. Pro teruro ŝi lasis fali la mangavarzon. Dum miaj fratoj batregalis la ŝajn, mi diris: La planko kolorigas ruĝa pro sango, se vi ne iĝos mia amatino.

Sia fratino kuris eksteren, vokis helpon. Sed, antaŭ ol helpantoj venis, armitaj per forkegoj kaj akompanitaj de hundoj, ni saltis en la Nethe kaj de la transa bordo spitis al ili ĝojkore.

Poste mi preskaŭ frenzeziĝis, ĉar mi sentis, ke ĉion mi fuší. Mi ne plu sentis emon al iu ajn laboro. Tagon post tago mi kuší malantaŭ la kano, kašobservante ŝian domon. Se ŝi amas min, ŝi foje venos ĝis la rivera bordo, ĉar nia kabano de tie estis

## FELIX TIMMERMANS

Felix Timmermans ni povas konsideri la plej populara el la flandraj literaturistoj de l' nuntempo. Multaj tradukoj vaste ko-



nigas liajn verkojn, precipe en meza kaj norda Eŭropo kie ili

estas alte taksataj. Timmermans senkonteste rangas inter la plej famaj aŭtoroj de l' kontinento.

En Esperanto jam aperis ia. lia « Pallieter », rimarkinda pentraĵo beletra, kiu pensigas al la mondofamaj verkoj de la flandraj majstroj de l' peniko : Rubens kaj Brugghel. Unike li skizas la vivon, la ĝuamon, la mistikismon, la voluptemon de sia popolo. En liaj verkoj apudas la piema sereneco de la flandraj beginoj kaj la bruema krudeco de la vivoardo.

Grandioza laŭdkanto al la tero estas lia majstroverko « Kampula Psalmo ». La ligitecon de la flandra kampulo al la granda, eterna kaj universala fonto de vivo li gloriegas en romano, sur kies kruda tono reliefigas la fundamenta lego de la naturo.

La unuan ĉapitron ni ĉi tie presas en Esperanto-traduko kun la bonvolia permeso de la fama aŭtoro, kiu plurfoje jam montris varman simption al la internacia lingvo.

E. CORTVRIENDT.

La postan dimanĉon mi vidis ŝin sur la transa digo revenante kun ŝia fratino de la posttagmeza Diservo.

— Nu, mi vokis maltime, ĉu vi bone digestis la pantranĉojn?

Si trilridis, ion diris al ŝia fratino, kiu kunridis. Mi tre konfuziĝis, sed tamen kriis: Ĉu tutan panon mi povas porti al vi? Ni jus bakis!

Ridantaj ili malsuprenkuris la digon, en herbejeton. Si ankoraŭfoje returne rigardis.

— Morgaŭ mi venos, mi kris kuraĝigita.

Mansvinge mi salutis. Si respondis sammaniere. Mi sentis, ke bone statis la afero, kaj mia koro maltrankvilhigis tiamezure, ke mi ne kapablis resti en sama trinkejo pli ol kvin minutojn.

La postan tagon, je vesperigo, mi kolektis ĉiun mian kuraĝon, enpakis la panon en tukon, kaj senparole ekiris. Necesis tuta horo por la ĉirkaŭiro laŭ la urbo. Mi malfermis la pordon. Tie kvinope sidis ŝiaj fratoj, kaj ŝia patro, ulo kiel pilastro. Terpomoj ili mangis el unu komuna pato. Multon mi ne diris. Nur, ke mi alportas panon por « ŝi ». Ŝian nomon mi ankoraŭ ne konis. Si hontis, plorpreta. Kiel precize okazis, mi ne kapablis klarigi, sed post momento mi kuší ekstere, baraktanta en foso. Mian panon ili konservis. Mi aŭdis ilin ridi. Kontraŭstari al ses ja estas malebla. Mi sentis min kvazaŭ mi estis sako da rompitaj pipubojo. Mi rampis al mia hejmo, kolera kiel tigro, venĝoifa, sed kun la firma intenco akiri la knabinon.

bene videbla.

Iun sabaton, kiam mi preskaŭ rezignos ŝin, mi vidis ŝin alproksimiĝi tra la arba vojeto por ĉerpi akvon. Kiam ŝi estis ĉerpinta la unuan sitelon, mi kriis: Hola! Ŝi ektimis, ne kuraĝis respondi, sed mansigne konsilis al mi foriri.

— Momenton, mi venas! mi kriis.

Mi demetas mian ĉapon kaj transnaĝis. Pro angoro ŝi haltis kaj ekploris pro amo al mi. Ni sidiĝis. Ni ambaŭ estis junaj, varmsangaj. La renkontitaj malhelpoj ekskitis nin, kaj, jes ja, pri pato ni ne plu parolis. Malrapide kaj fajfante mi naĝis returne. Tiun vesperon mi tiom kantadis,

ke la najbaroj opinis min freneza. De temp' al tempo ni vespere tiel renkontiĝis. Estis la rikolta tempo. Ŝvelmolaj estis la fojneoj kaj bonodoraj. Kaj okazis kion mi konjekcis. Iom pli ol monaton poste ŝia patro venis al ni. Li deziris paroli kun mi. Mian hakilon mi prengis. Li demandis pri miaj intenco: edziĝi al la knabino, jes aŭ ne, kaj se jes, tiam plej baldaŭ!

— Jes, mi diris, sed aldonu ĉevalon kaj bovinon.

Li konsentis. Estis bela geedziĝa festo, kaj nia karmemora patro dancis pro felico.

— Bone vi faris tion, Radiko, li diris.

Tiu unua nokto! Sonoriletoj oni fiksas sub nia lito, kaj Fien verŝajne trinkis pli ol konvene, ĉar ŝi plendis pri forta kapdoloro. Mi pensis: oni ne mistifikos min, sufiĉan tempon mi havas. Mi iris promeni en la lunobrilo. Falēpreta staris la greno, kaj ĉu lito pli invita ekzistas? Mi kušíĝis kaj rigardadis la stelojn. Plaĉas al mi ilin

rigardi. Ion nekutiman oni tiom eksantas. Frankvila iĝas la koro, kaj oni pensas pri aferoj kiujn pripensi oni aliam ne havas tempon. Al la Sinjoro, kiu ĉion kreis, kaj al la malgraveco de l'propra ekzistado. La sinjoro pastro diras, ke la steloj estas tiel grandaj, kiel tergloboj. Al la papero ne mankas tolero; tamen, dum mi tie kuſadis, sento grandioza kaj solena kaptis min, kvazaŭ en pregejo, kaj mi promesis al mi mem servi ĉiam al Dio kaj al mia proksimulo laŭ mia plej bona kapablo.

La postan tagon, je sunlevigo, helpata de Fien, mi falĉis la grenon, kiu nokte servis al mi kiel lito. Kaj jam komenciĝis la mizerio. Je la sepa Fien alportis kafon kaj panon. Apenaŭ ni sidiĝis kaj glutis la unuan bušprenon, kiam ŝi subite ĝemkriis:

— Mi ne plu kapablas elteni, plumbe pezas al mi la kapo! Si devis iri domen. Mi restis sola, luktanta kun la suno kaj vasta areo da greno.

Kia mizerio iĝis tiu eterna kapdoloro! Kaj kiam oni mem ne sentas ĝin, oni finfine konkludas ke estas imago, komedio. Tiam kelkfoje interŝangiĝis akraj vortoj. Multaj monon kaj zorgojn kostis al ni tiu kapdoloro: la kuraciston, la sanigiston, la sorĉiston Aloizo, kaj sennombrajn piligrimadojn. Mian edzinon mi apenaŭ vidas sen la tradiciaj vatoj kaj vindo ĉirkaŭ la kapo.

Foje ni pilgrimis al Peuthy. Resanigita ŝi revenis. Dum du semajnoj ŝi ne plu sentis plej etan doloron.

— Radiko, ŝi diris, mi resanigis. Ni danku al nia sinjoro pastro per donaco.

Ni jus buĉis nian porkon, kaj fieris portis al li ĝian kapon.

— Tre bone, li diris, sed kial kapon?

— Ĉar mia kapo resanigis.

— Bedaŭrinde ke al vi ne doloris alia koroparto, li diris, eble mi estus ricevinta paron da ŝinko.

Cetere li estas bona homo, nia pastro, lojal, eĉ kelkfoje sankta. Li posedas serviston, kiu estras lin, okaze lin furiozglasas ĝiskreve. Donacojn li ŝatigas kaj avidas; aliflanke li fordonas ĉion, sin senvestigante ĝisĉemeze. « La vivo ne estas ŝero », li diras, sed ploranta mi neniam vidis lin. Li ofte tranpaſas nian sojlon. Ĉiufoje ni komplezas al li per glaso da lakteto, rekte de l' bovina mambo. Se ni estas sur la kampo, mi krias al li: Faru do! Tiam li mem iras en la stalon por plenigi al si unu glason... aŭ eble du. Senkontrole, kiu ja scias?

La sinjoro pastro konas min tute. Li scias kaj konsolas nian mizeron kaj matricon. Ĉiujare, je Pasko, mi elſutas mian pekosakon sur lian kapon. Mi ĉiam promesas fariĝi pli bone homo, sed mi ne estas ei ŝtono. La Kara Di-Sinjoro semis nin sur la teron kun niaj manoj, kaj tiaj li reprenis nin. Eksterne ŝiaj manoj? Afero por bigotoj kaj pietistoj! Kampulo, kiu plenumas sian devon havas alian laboren: eksterne kardojn kaj herbaĉojn, kaj ankaŭ la limakojn kiuj minacas liajn fruktojn. La kampo ne lasas al li tempon nek okazon por ke li staru postmorto dorsopage kontraŭ pregeja kolono kun ora telero malantaŭ la kapo. Kaj tamen, ekzistas iu Sankta Izidoro, kiun enprege mi ofte alvokas. Dum li preĝas, la angeloj semante kaj plugante lin anstataŭis. Mi ne provas imiti Sanktan Izidoron, ĉar mi estas ja tre feliĉa, ke programane mi povas plenumi mian laboron.

Pezo estis al ni tiu unua jaro, kaj ankorau plipeza estis la dua. Alta estis la luprozo. La pimpulino de l' kastelo pretendis, ke junaj homoj kapablas perlabori kaj konsekvence lupagi plimulte, tial ke pli laborkapablaj ili estas.

Nia bovino devis naski. Ni elſiris, vivanta, la bovidon, sed la bovino mortaĉis. Kuirante la porkomanĝojn mi brulvundis mian piedon. Du semajnojn mi devis resti sidanta. Furioziga malaktivco. Porkaĉo! Kiam ni buĉis ĝin, la pastro reportis al ni la ses donacajn kofletojn: nemangebaj. La vivo ne estas ŝero, li diris, via porkajo gustas galamare. Dum la tuta vintro ni devis nin kontentigi per ĝi.

Por variigi nian menuon mi nokte ŝtelĉasis. La vintro pinĉis, kiel ŝtono estis la tero, plej fortika forkego ĝin ne penetris; ni ne kapablis eligi el siaj terkavoj la napoloj kaj betojn. Aperis kometo, kiu tim-tremigis la kampulojn. Ni observis la kampojn, kaj la malhelajn nubojn, kiuj aldrivis

de trans la Nethe kaj kiuj re kaj ree alportis neĝon. Tiam venis uraganoj, kiuj tremskuis nian dometon, tiamezure, ke mi enlitigis nedemetinte la pantalonon. Difektigis nia tegmento kaj tri pomarboj rompiĝis. Tondris mezvinire. Sed al ĉio estas fino. Je Karnavalo ekdegeleis kaj pluvegis dum pluraj tagoj. La kampo iĝis kaĉo. Sude le ĉielo restis malhela kaj nebula. Minaca estis tiu Sudo. Tiam ni ricevis la grandan baton. Pri ĝi kulpas la kometo. La Nethe rompis siajn digojn. Subakyigis la kampoj, kaj trans nian sojlon nia vintra greno drivis al ni renkonte. Kaj tiu saman vesperon, dum ni ĝismaleole vadis en la akvo, naskigis nia Paŭējon. Generita apud, kaj naskita super la akvo! La besiejn el la stalo, escepte la ĉevalon, mi venigis en la domon, por ke ili ne dronpereu. Kunates-tantoj ili estis : la bovido, la juna porko kaj la kunkloj. Bela Salamandro, la cies-helpulino de la najbararo, helpis al ni. Ĉu ceterulo jam havis suficien laboron en propra bieno fiŝante potojn kaj patojn. La akvo malrapide altiĝis. Nia Paŭējo ne sen-pene eniris la mondron.

Pro la suterado de Fien rompiĝis mia koro, kaj la superakyigon mi forgesis. Bela Salamandro ja diris : — La elten-kapablo de l' homo estas en rilato kun la suteroj per kiu Dio ŝargas lin. Aŭ tro-argentinti, mortigas lin, mi krompensis. Nur tiam mi envere sentis kiamezure mi amas mian edzinon. Mi bedaŭris ĉiujn miajn riprokojn al ŝi, kaj, jes ja, la kruda Radiko ekgenuigis en la akvon kaj kiel infano alvokis la helpon de Nia Sinjorino. Sed Bela kriis : « Kokerikado, intan' por parado! » kaj puŝis al mi nian Paŭējon sub la nazon. Ridis mia Fien, kaj ridis mi. Malofte mi sentis min tiome feliĉa. Eniris la pastrō kun suprenfaldita sutano, en akvorezistaj batoj, kaj kun la pipo en la bušo.

— Gratulojn al vi, Radiko, li diris, la etulon vi nomu Moizo, ĉar jen la akvo

malaltigas.

Plie Fien ankoraŭ suferis du abortojn. Sed estis nia konsolo, ke Dio lasis al ni nian Paŭējon. Lasis al ni, sed ne longatempe. Ke la Kara Di-Sinjoro ūion faris al mi, mi ankoraŭ ne kapablas agnoski. Kaj se iam mi eniras la ĉielon, mi persone volas demandi Lin, kial mi meritis tian punon. Eble ekzistas kialo, sed mi ne prepe deziras ĝin koni. Se ne, mi ne trankviline povos kunkanti la Halelujon.

Ho, kia superbela, sanega infano ĝi estis! Nemirinde pro la bonega lakteto de mia edzino. Kiam ĝi suĉante kuſiĝis ĉe ŝiaj belaj, grandaj mamoj, mi rigardis kaj aŭskultis lasante estingiĝi mian pipon. Kaj kiam mi perokule sekvis la tikiĝajn palprenojn de la rugaj manetoj, mi iĝis molkora, kaj necesis, ke mi foje sakru por retrovi la virecon.

Mi neniam estis kantema, sed, por ĝin endormigi, mi volonte blekis dum pli ol tuta horo apud ĝia lulilo; tiomlonge, ĝis kunblekis nia ekscitita hundo. Dimanĝatene, kiam la lito tenas min pli longe ol kutime, mi lasis ĝin rampi trans mian korpon, tiri miajn harojn kaj lipharojn, ĝis larmoj saltis al mi en la okulojn.

Inteligenta kaj sprita ĝi estis! Gi ludis kun la kato kaj la hundo. Skue ĝi ridis kiam ĝi povis tiri la vosteton de mia porko. Rajde ĝi sidis kune kun mi sur nia ĉevalo, kun mia pipo en la bušo. Gi akompanis min al la kampo, al la trinkejo, dimanĝe dum la promeno. Freneze mi amis tiun infanon. Kaj kiom da ludiloj mi fabrikis por ĝi : lignajn pulcineolojn, anasetojn kiuj kapablis drivi sur la akvo, kaj malgrandan ventmuileton.

Ni eniris la vintron. Dum marto nia Paŭējo iĝis dujara. En la veturilejo mi ligis karotojn je faskoj. Apud mi estis nia Paŭējo. Subite tie staris ostmalika vag-vendistino.

— Ci vi bezonas alumetojn?

Da ili mi ankoraŭ havis suficiajn. Fien donis al ŝi pantranĉon kun porkograso.

— Kia bela infanteto, kapravoĉe blekis la inaĉo, kaj ŝi karesis la kapon de nia Paŭējo.

Si foriris, kaj apenaŭ kvaronhoron poste la infano ekrugiĝis. Resti staraĵo ĝi ne plu kapablis. Gi veis lamente kaj strabis kiel lutro. Tuj la kuraciston! Tiu orumita azeno konkludis al misdigesto, kaj preskribis boteleton. Tiu boteleto pligravigis la aferon. Paŭējo similis ardantan karbajon. Mi venigis la pastron. Li legis iom en sia breviero kaj krucesignis. Bela Salamandro metis la medalon de Sankta Benedikto sur ĝian koreton kaj bruligis kan-delon de Lourdes. Mi venigis Aloizon, la ekzorciston. — Malbona sorto, li diris. Iru al Kruiskensberg, kaj se ĉiuj putetoj ne estas malplenaj la infano resanigos, se ĉiuj vendredon dum tutaj jaroj vi recitos la preĝon de Imperiestro Karlo.

— Mi tien! Grandega feliĉo! Plenplenaĵ estis la putetoj. Mi ne plu memoras kiel mi revenis. Kvazaŭ fluge super barilojn kaj hegojn. Sed, kiam mi malfermis la pordon, nia Paŭējo, verdokolora, kuſiĝis senviva en la sino de Fien.

Kiom da veoj kaj lamentoj ehis en nia dometo!

Densa estis la nebulo, kiam Bela Salamandro la memfaritan lignan ĉerketon portis al la tombejo. Mi kuniris. Kiam ĝi malaperis en la teron mi plorĝemis kaj blasfemis. Tiom malgaje miens la tombisto, ke mi donis al li duduk cendojn. Sed li diris : — Estu ĝoja, Radiko, unu angeleto pli nun estas en la ĉielo. La ulo pivitis pro la vangotrapo kiun li ricevis. Necesis droniĝi mian kordoloron. En la apuda « Lasta Adiaño » ni komencis drin-kadi. Tagmeze Bela per kareo veturigis min al mia hejmo.

Sed poste! Malplena estas la domo. La

vocoj timige ĝin plenigas. Oni ne kuragas laŭte paroli. Pri la infano oni silentas por reciproke ne inciti la doloron, kaj tamen, pri kio alia oni parolu? Tiu silento, silento! Mortresone krakbruas la ŝtuparo. For estas la infano, le bela infano. Enfermite en la tero ĝi kuſas, kaj malgraue vi ĉiumomento atendas ĝin, streĉas la orelojn por aŭdi ĝian ridon kaj vokon. Estas la sepa : nun ĝi enlitigis; estas la kvara : nun ĝi petis buterpanon kun siropo.

La hundo ĝin sercas. Gi prifluras la ŝuetojn, alrigardas nin, kaj poste denove la ŝuetojn, kaj iras eksteren por serci nian Paŭējon.

— Kie estas nia Paŭējo? demandas la edzino al la hundo. Tiam necesas foriri aŭ blasfemi. Kaj la ludilaro! Mi kaſas ĝin en la subegmentoj, kvankam prefere mi metus ĝin en montro ŝrankon. Mia edzino foje genuigis apud ĝi. Tiam mi ĝin kovris per tuko. Sed, kiam sola mi estis hejme, mi rampis sur la subegmentoj, balancigis la ĉeaveton, turnigis la mueleton. Mi komencis drinkadi. Sed venis momento, ke mi memoris la stelojn de mia edziĝa nokto kaj mian promeson. La botelojn da brando mi malplenis sur la sterkejo. Nia familia vivo frakasiĝis. La laborado ne plu prosperis al mi. Kaj tamen necesas labori.

Betojn ni ŝiras sur la kampo. Kaj recfluas ŝiaj larmoj. Si surgenuiĝis : — Nun mi ne plu havas infaneton, nun ni ne plu havas infaneton!

Rompigis mia koro. Mi levis ŝin, brakumis ŝin, kaj promesis al ŝi novan infaneton. Si rekaptis kuragon.

Ciam mi plenplenis mian devon. Pro tio mi ja estas viro, pro tio mi ja estas homo. Dank' al Dio!

(1) Urbeto en Flandrujo kie estas flagataj mensaj malsanuloj.

(2) Rivero.

**ELEMENTAIRE LEERBOEKEN**  
Esperanto-Sieutel door Fr. Schoofs. Bevat de elementaire grammatika en de lijst der grondwoorden. 32 p. fr. 1.—  
**Esperanto-Leerboekje** door Fr. Schoofs. 32 p. fr. 1.—  
**Fundamento de Esperanto** door L. Zamenhof. 112 p. fr. 7,50  
**Het Esperanto in Tien Lessen** door A. Witteryck. 76 p. fr. 8.—  
\* **Nieuw Leerboek** door F. Szilagyi (Penterman). Geill. 100 p. fr. 18.—  
**Esperanto in een Doosje** door H. Bakker. Met sleutel en kaartessysteem. Speciaal voor zelfonderricht. 200 p. fr. 40.—  
